

## Iom da agado okaze de la Trilanda Kongreso

Heidi Goes [heidi.goes@gmail.com](mailto:heidi.goes@gmail.com)

Pro invito de AEA kaj NZEA, al kiuj iras mia elkora danko, mi povis prelegi pri la historio de la indonezia Esperanto-movado dum la dua Trilanda Kongreso de Esperanto en Bekasi, Javo. Pri mia tiu-tema libro min intervjuis Franciska Toubale por la radio 3zzz. Alia por mi aparte ĝojiga afero dum tiu kongreso estis, ke mi povis preparoli la Esperanto-agadon en Orienta Timoro kun dek el miaj lernantoj, kaj vidi kiel ili prezentis interalie kantojn kaj dancojn al la publiko.

Tamen, ĉar laŭ mi ne indas flugi tiom for por nur kelkaj tagoj, mi entute pasigis tri semajnojn en Javo. Mi vizitis amikojn kaj ‘familianojn’ (de mia kultura interŝanĝ-restado antaŭ 23 jaroj...), al kiuj mi kompreneble rakontis pri Esperanto, kaj ĉe kelkaj lasis ĉu ŝlosilo, ĉu Fundamento en la indonezia (por tiu lasta dankindas la Esperanto-klubo de Bruĝo, kiu ilin pagis). Plie, pro tio ke ili ne sukcesis veni al la kongreso, mi vizitis du indoneziajn veteranojn: Rijanto Husadha kaj Gunawan Esperantista Wibisana. Mi povis donaci al ili kongreslibron kun salutoj de la kongresanoj kaj respektive kongrestaso kaj kongressako. Bedaŭrinde mi ne plu povis viziti Herao Wibisono, sed mi fine sukcesis kontakti lian filon, kiu promesis aranĝi iam retan babiladon inter ni, kaj la kongreslibro estas sendita al li de Ilia Sumilfia Dewi.

En la Universitato de Semarang mi donis, laŭ peto de Imam Prayogo, 45-minutan enkondukan lecionon al ĉirkaŭ 50 el liaj studentoj. Ili entuziasmiĝis, kaj unu el ili tuj la saman tagon verkis artikolon pri la leciono kaj pri Esperanto en la retpaĝo de la ĵurnalo *Tribun Jateng* (Meza Javo). Ne klaras, ĉu ĝi aperis ankaŭ papere. Mi provis viziti la filon de Liem Tjong Hie, sed li estis eksterlande por prizorgo en malsanulejo. Mi ja sukcesis kun Imam viziti Henry Hartaka Hardjadinata, kiu estis iam lernanto de Francis D. Yury.

De Semarang min veturigis Lia Elizabeth, alia antaŭe lernanto de Francis D. Yury, al Lasem. Tie mi pasigis horojn inter malnovaj Esperanto-libroj, klare devenaj el la iama biblioteko de Liem Tjong Hie, unu el la plej aktivaj esperantistoj de Indonezio dum jardekoj. Mi



sukcesis trovi kelkajn rarajojn, kaj plurajn ekzemplerojn de lia lasta revuo, *Indonezia Esperantisto*. Bedaŭrinde la tuto estis tro malbone konservita, pluraj ekzempleroj jam disfaletis kaj/aŭ jam montris spurojn (kaj precipe odoron) de ŝimo,

ke ne indis (nek estus sana) kunporti/aĉeti la tuton.

Ekzemplerojn de *Indonezia Esperantisto* mi lasis al Esperantista Gunawan Wibisana kaj Hendrikus Franz Josef. La unua jam antaŭe ricevis ankaŭ legolibrojn kaj sufiĉe da ekzempleroj de la Fundamento por la esperantistoj en Yogyakarta (sed ili ankoraŭ ne iris por preni siajn ekzemplerojn...). La dua laboras por regiona biblioteko en Yogyakarta, kaj kvankam la revuo estis eldonita en Semarang, ĝi povus konserviĝi tie. En Yogyakarta mi ankaŭ sukcesis renkonti la poeton kaj aŭtoron Yohanes Manhitu, kaj pere de li kelkaj entuziasmoj por Esperanto. Kontraŭe al multaj antaŭaj membroj de la klubo en tiu urbo, kiuj studis tie kaj poste forlasis ĝin, ili loĝas tie, kaj do, se ili sufiĉe entuziasmas por lerni, tio estus bona afero. Precipe, ĉar ili estas aktivaj kajto-ludantoj, kaj konkuras je internacia nivelo. Ili eĉ proponis, ke al sekvaj eksterlandaj konkursoj partoprenu nur tiuj membroj kiuj parolas Esperanton... Ni vidu... Reen en Ĝakarto mi lasis serion de *Indonezia Esperantisto* ankaŭ ĉe Ilia Sumilfia Dewi, por Indonezia Esperanto-Asocio.